Prezo: 6 €
www.satesperanto.org
Septembro-Decembro 2022 | n-ro 09-12 (1407-1410)

# Sennaciulo

Oficiala organo de Sennacieca Asocio Tutmonda



SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo!

# Perantoj

**Aŭstralio** – Franciska Toubale
1 Marne Road, Mount Evelyn, Victoria 3796, Aŭstralio
rete: fran14@bigpond.net.au
**Belgio** – Claude Glady
Rue du Culot, 1, BE-5630 CERFONTAINE
Tel-Fakso-Respondilo: 00-32- (0)71 644916
Rete: cglady@arcadis.be
Bankkonto: 750-6373051-18
IBAN: BE50 7506 3730 5118, BIC: AXABBE22
**Bosnio-Hercegovino** – Fetah Zvirac
Esada Pašalića 6
71000 Sarajevo
Bosna i Hercegovina
rete: fetahzvirac@gmail.com
tel. (poŝa): +387 (0)61 170 094
**Brazilo** – Fernando Pita,
Estrada Coronel Vieira, 134, Bl. 03 Ap. 402, Bairro Irajá
BR-21220-310 Rio de Janeiro
rete: magisterpita@gmail.com
tel: +55 21 98863-3854
**Britio** – Arturo Prent
7 Walton Gardens, Hutton, Brentwood, Essex CM13 1EJ, Britio
tel.: +44.1 .277.22.89.62
Nomo: "SAT Sennacieca Asocio Tutmonda"
Bank-kodo: 09 01 56 / Kont-n-ro: 57604003
BIC: ABBYGB2LXXX
IBAN: GB62ABBY09015657604003
rete: ap_esp-sat21@yahoo.co.uk
**Bulgario** – Metodi Markov
Vasil Levski, 20; BG-2700 Blagoevgrad; Bulgario
tel. (fiksa): +359 73882791, (poŝa): +359 879040403
rete: mam1948@abv.bg
IBAN: BG98FINV915010BGN030E5; BIC: FINVBGSF
**Ĉinio** – Bruno Guy Claude Henry
rete: esperanto.bhenry@yahoo.fr
Bankkonto n-ro 6217857500009246684
SWIFT kodo/BIC: BKCHCNBJ970
Bank of China - Hunan Branch n-ro 593 1, Duan Furong Road (M) Changsha - Hunan - Ĉinio
**Francio** – Barthélémy Maurau
Appartement 120, 3 allée Nathalie SARRAUTE
FR-27000 EVREUX, Francio
rete: barthelemy.maurau@free.fr
**Germanio** – Gary Mickle
Brüsseler Str. 6, DE-13353 Berlin, Germanio
rete: gmickle@nexgo.de
**Hispanio** – Pedro María Sanz Sanz
Apartado 8042, ES-28080 Madrid
rete: pedrosanzsat@gmail.com
Konto: 0182-9465-65-0200272726 (BBVA)
IBAN: ES48 0182 9465 6502 0027 2726
BIC: BBVAESMM
**Hungario** – PETIK Janos (35623)
Hársfa u. 31. I/7
HU-3104 Salgótarján
retadreso: kitepsonaj@gmail.com
**Italio** – Nicola Ruggiero
Via Francesco Petrarca, 9
IT-10126 Torino (TO)
rete: nicolaruggiero1986@gmail.com
IBAN: IT05Z0347501605CC0011648125
SWIFT/BIC: INGBITD1
**Izraelio** – Jehoŝua Tilleman
97-A Dereh-Akko, IL-26373 Kirjat-Mockin, Izraelio
rete: b48705544@013.net
**Japanio** – Nakamura Daiŝin
Shinagawaku Yashio 5-6-39-1006, JP-140-0003 Tokyo
rete: sat-peranto-japana@googlegroups.com
Poŝtkonto: 00980-9-37624 SAT-Nihon
**Katalunlingvio** – Sandra Vives (KEA)
Apartat 1008, ES-08200 Sabadell, Hispanio
tel.: +34 93 716 36 33, rete: sandra@esperanto.cat
**Koreio** – Jung Hyunsoo (Paz)
4014-2202, 156, Gwangyomaeul-ro, Yeongtong-gu
KR-16510 Suwon-si, Gyeonggi-do
rete: paze23@gmail.com
**Kroatio** – Ivica Ŝĉepanoviĉ (Truto)-poŝte
HR-21414 Gornji Humac (Otok Brac), Kroatio
Tel: +385.21.647.059, Poŝtel: +385.098.182.79.07
rete: ivica.scepanovic1@st.t-com.hr
Bankkonto: 3105505351 otpbanka
IBAN: HR51 2407 0003 1055 0535 1
BIC: OTPVHR2X
**Litovio** – Gražina Opulskienė
Obuoliuko 42, LT89213 Mažeikiai, Litovio
Tel.: +37068736457
rete: grazopul@yahoo.com
Bankkonto: LT347300010001720030
BIC/SWIFT: HABALT22, Swedbank
**Malagasio** – Justine (Lala) Ralalarisoa
Lot IIC - 72 - FD Manjakaray, MG-101
Antananarivo, Malagasio
rete: llrespr@libero.it
IBAN: MG46 0000 4000 0800 7694 2010 112
BIC: BMOIMGMG
**Norvegio** – Cécile Anda
Esperantoveien, LI, NO-4320 Hommersak, Norvegio
rete: cmranda@frisurf.no
**Portugalio** – PAZ Alexandra kaj PRIETO Roger
Joaquim Antonio de Aguiar 100, 1°
PT- 4000-309 PORTO
retadreso: alexandra.paz@gmail.com
retadreso: rogerprieto@gmail.com
Tel.: +351 916 793 285 / +351 915 067 954
Bankkonto: Caixa Geral de Depósitos
Konto: 0748007271900
IBAN: PT50003507480000727190049
BIC/SWIFT: CGDIPTPL
**Rusio** – Nikolao Gudskov
a/k 57, RU-105318 Moskvo, Rusio
rete: nikolao@yandex.ru
**Serbio** – Miomirka Kovačević
Španskih Boraca 32/2, RS-11070 Novi Beograd, Serbio
rete: miomirka.kovacevic@gmail.com
IBAN: RS35160003020011349313
SWIFT/BIC: DBDBRSBG
**Svedio** – Inga Johanson
Stampgatan 60B-1202, SE-411 01 Gotenburgo, Svedio
rete: ishim@hotmail.com aŭ ingajohansson50@gmail.com
Poŝtkonto: Svenska arbetaresperantoförbundet, n-ro 5 31 60-8
IBAN: SE75 9500 0099 6026 0053 1608
BIC: NDEASESS
**Svisio** – Dieter Rooke,
Interlakenstr. 122A, CH-3705 Faulensee.
rete: dieter.rooke@vtxmail.ch
tel:+41 62 396 01 86
**Ukrainio** – Andreo JANKOVSKIJ
str. Lajosha Havro 11-B, ap. 68, UA-04211 KIJV, Ukrainio
rete: andreoespero@gmail.com
telefone: 380 67 99 470 03
**Usono** – Brandon SOWERS
PO Box 52731
GA-30355 Atlanta
rete: bsowers@protonmail.com
**Ĉiuj landoj** – SAT-Sidejo
67 av. Gambetta, FR - 75020 Paris, Francio
rete (ĝenerala retadreso): kontakto@satesperanto.org
rete (pri financaĵoj): financoj@satesperanto.org
Tel.: (+33) 09 53 50 99 58
Poŝtkonto: 1234 22 K, La Banque Postale, Paris
IBAN: FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064
BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA: satx-s
Konto de SAT ĉe PayPal: financoj@satesperanto.org

## Kotizoj 2022

| Lando | Jarkotizo | Lando | Jarkotizo |
|---|---|---|---|
| Argentino | 8 € | Kongo, DR | 4 € |
| Aŭstralio | 48 € | Koreio | 36 € |
| Aŭstrio | 48 € | Kroatio | 16 € |
| Barato | 4 € | Kubo | 4 € |
| Belgio | 48 € | Latvio | 12 € |
| Bosnio-Herc. | 8 € | Litovio | 12 € |
| Brazilo | 16 € | Luksemburgio | 48 € |
| Britio | 48 € | Madagaskaro | 4 € |
| Bulgario | 8 € | Makedonio | 8 € |
| Ĉeĥio | 24 € | Malio | 4 € |
| Ĉinio | 8 € | Meksiko | 12 € |
| Danio | 48 € | Mongolio | 4 € |
| Estonio | 16 € | Nederlando | 48 € |
| Finnlando | 48 € | Nepalo | 4 € |
| Francio | 48 € | Norvegio | 48 € |
| Germanio | 48 € | Pollando | 16 € |
| Grekio | 8 € | Portugalio | 24 € |
| Haitio | 4 € | Rumanio | 12 € |
| Hispanio | 36 € | Rusio | 12 € |
| Hungario | 16 € | Serbio | 8 € |
| Irano | 8 € | Slovakio | 16 € |
| Irlando | 48 € | Slovenio | 16 € |
| Islando | 36 € | Svedio | 48 € |
| Israelo | 36 € | Svisio | 48 € |
| Italio | 44 € | Tajvano | 32 € |
| Japanio | 48 € | Turkio | 12 € |
| Kanado | 48 € | Ukrainio | 4 € |
| Kolombio | 8 € | Usono | 48 € |
| Kostariko | 12 € | | |

**DUMVIVA MEMBRECO: 1 300 €**

Por **Francio**, **Germanio**, **Hungario** kaj **Norvegio**, pagu al la SAT-konto en Parizo (vidu detalojn en "**Ĉiuj landoj**") sed nepre informu la peranton kaj la SAT-kasiston pri via pago.

> Por la nemenciitaj landoj la ĉi-jara baza kotizo al SAT estas 4 €. La PK indikos la prezon de la postaj jarkotizoj.

> **Nura abono al *Sennaciulo*: 75% de la kotizprezo en la koncerna lando.** Pagante ĉi sumon, nemembro povas jaraboni *Sennaciulon* + ĝian jaran suplementon *Sennacieca Revuo*.

> Aktiva membro pagas la plenan jarkotizon. Li/ŝi ricevas, perrete kaj surpapere, *Sennaciulon* + ĝian jaran suplementon *Sennacieca Revuo*.

> Help- kaj grup-membroj pagas minimume duoblon de la plena jarkotizo kaj ricevas la samajn rajtojn kaj servojn.

> Malriĉaj emeritoj, kiuj ne povas pagi plenan jarkotizon, senlaboruloj kaj junuloj (ĝis 25-jaraj) pagas minimume la duonon de la plena jarkotizo, kaj ricevas la samajn rajtojn kaj servojn.

> Samfamiliano de membro pagas la duonon de la jarkotizo. Li/ŝi ĝuas la samajn rajtojn (ekzemple dum kongreso) sed ne ricevas la asocian organon nek la SAT-Adresaron.

*Sennaciulo*
Organe officiel de SAT / Oficiala organo de SAT

**Siège de SAT / Asocia sidejo de SAT**
67 avenue Gambetta,
FR-75020 Paris, Francio
*Retadreso:* kontakto@satesperanto.org
*Retejo:* http://satesperanto.org
*Tel.:* (+33) 09 53 50 99 58
*Poŝtkonto:*
1234-22 K, Paris
IBAN: FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064
BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA: satx-s
Konto de SAT ĉe PayPal: financoj@satesperanto.org
**Plenum-Komitato de SAT**
*Prezidanto:* Vinko Markovo
*Vic-prezidanto:* Pedro Sanz
*Sekretario:* Brandon Sowers
*Kasisto:* Bruno Henry
*Vic-kasisto:* Alexandra Paz
*Ceteraj membroj:* Saioa Escobar, Paz (Jung Hyunsoo), Dominiko Simeone
*Reprezantoj de SAT en la LEA-Komitato:* Saioa Escobar, Paz
**Sennaciulo**
*Redaktoskipa kunordiganto:* Vinko Markovo
*Enpaĝiganto:* Nicolas Raymond
*Ceteraj redaktantoj:* José Antonio del Barrio, Gary Mickle, Rob Moerbeek, Grazina Opulskiene, Marcel Redoulez, José María Salguero (Kani), Richard Schneller kaj Franciska Toubale
*Kontribuojn sendu elektronike al:*
sennaciulo.redaktejo@gmail.com
*aŭ paperpoŝte al*:
SAT-Amikaro
132-134 boulevard Vincent Auriol
FR-75013 Paris, Francio
*Pri financaj aferoj sendu al:*
financoj@satesperanto.org
*Libromendojn sendu al:*
libroservo@sat-amikaro.org
*Librajn eldonproponojn sendu al:*
pimskrabo@yahoo.fr
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas.
Imprimé par/*Presita de:*
TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris.
Aperas dumonate - Bimestriel.
Abonnement annuel/*jara abono:*
France 36 €
Autres pays/*aliaj landoj:* petu la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-centro.
Dépot légal à la date de parution:
N° CPPAP 05 25 G 86567
N°ISSN:1163-0442

## *REDAKTANGULO*

Karaj legantoj,

Jen la numero 9-12 de *Sennaciulo*, formale la lasta el la jaro 2022. Denove post jardeko, necesas prezenti al vi kvaroblan numeron de *Sennaciulo*, ĉar momente ne eblas rekapti malfruon en la aperritmo alimaniere ol per pure administraj rimedoj. Kun tiu ĉi numero estas kunsendita *Sennacieca Revuo*. Kun la venonta numero estas planite ekspedi la adresaron 2023, do se vi ne deziras ke via nomo aperu en ĝi, nepre tuj avertu pri tio.

Ĉi-tiun numeron plenigas multaj artikoloj rilataj al la milito en Ukrainio. Ŝatantoj de redaktejaj intervenoj pri la enhavo notu, ke ĉi-foje unu el la proponitaj kontribuoj vekis tujan reagon de du skipanoj. Vi plie trovos informojn pri la ekskursoj kaj prelegoj okazintaj dum la 96a SAT-kongreso.

Laste, ĉar la pasintfoja limdato pri kandidatiĝo al la venonta PK vekis ĉe kelkaj la impreson, ke ĝi estus strikta limo, sciu ke ĝi delonge utilas ĉefe kiel insitigilo al ĉiuj ekpripensi la aferon. Dum la lastaj jardekoj, preskaŭ ĉiam kandidatiĝoj estis akceptitaj ĝis la kongreso, kaj foje la kongreso eĉ decidis plilongigi tiun periodon, ĉifoje eĉ ĝis la fino de oktobro, kiel klarigite en aparte kunsendita letero. Cetere, dum la referendumo ankaŭ elektiĝos Ĝeneralaj Konsilantoj el diversaj mondopartoj (kategorio A), kiuj havas la taskon kontroli la laboron de la PK inter la kongresoj.

Agrablan kaj partopren-instigan legadon deziras al vi

La redaktoskipo

**Frontpaĝa bildo:**

**Kastelo de Anĝevo**

El vikipedio, aŭtoro: Raydou

# Enhavo

Enhavo

**Tra la Mondo: Orienta Eŭropo**

p.4 Milito kaj armado

p.6 Iu detalo en la sekvoj de la ukrainia milito

p.8 Nun Ukrainio bezonas aliancanojn, ne parolon pri neŭtraleco

p.11 La obskura flanko de la neŭtraleco

p.13 La orkestro de la blinduloj, surduloj, amneziuloj, ĉarlatanoj kaj la komplicoj ludas sian partituron

p.14 Rusio: Ĉina kolonio?

p.17 La rusa: murdista lingvo

p.20 Naciismo, semantiko kaj politiko

p.21 Lingvoj "kulpaj"

**Tra la mondo : Azio**

p.22 Solidareca manifestacio por batalantaj kamparanoj (Chiba, Japanio)

**Medio**

p.23 Infanoj, la plej seriozaj suferantoj en la nuklea katastrofo

p.24 Infanoj post 10 jaroj de la nuklea akcidento

**Opinioj, reagoj**

p.25 Reage al la pri-Belveder-a artikolo

p.26 Laŭdo al la dialektiko

p.27 Laŭdo al la dubo

**Liberpensula frakcio**

p.28 Pri Dio, Karlo – kaj la knabo

**SAT-anoj aktivas**

p.29 Raporto pri la unua kunsido de koreaj SAT-anoj en 2023

p.30 Kial la anarkiisto varbiĝis por la Literatura Esperanto-Konkurso

**Nekrologoj**

p.32 Dorothy Enderby (36208)

p.32 Marcel Leereveld (19426)

**Beletro**

p.33 Kalendaro, februaro

**Dua komuniko pri la 96a SAT-Kongreso**

p.33 Dua listo de aliĝintoj

p.36 Ekskursoj, Prelegoj kaj kulturaj programeroj

**Tra Esperantio**

p.34 Aktualaĵoj pri vojaĝo okazinta antaŭ 90 jaroj : la vojaĝo de Péraire iĝas cifereca

**El la SAT-administrejo**

p.33 Novaliĝoj

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn ni ne resendas. Kontribuojn sendu al:*

**sennaciulo.redaktejo@gmail.com**

# Milito kaj armado

Ekde la komenco de la milito en Ukrainio, en la 24a de Februaro 2022, mi kredas, ke multaj homoj vivas en malbona kaj peza humoro. Eskaliĝas la batalo pli kaj pli, kaj ni ne povas antaŭvidi, kia rezulto sekvos. Mi timas, ke la tiel nomata "speciala milit-operaco" kondukos la mondon al la tria mondmilito. La eksprezidento de Rusio, Medvedev, kaj la naciistaj argumentuloj en Rusio histerie krias pri uzo de nukleaj armiloj. Se la teruraj bomboj estus uzitaj fare de Rusio, eĉ se ili estus kun limigita povo, tio metus la tutan homaron en katastrofon.

Mi scias la komplikecon de la situacio, ke en la orienta parto de Ukrainio daŭras milita konflikto ekde la jaro 2014, kaj ke ekzistas etna, politika kaj historia komplikeco en la regiono. Sed la unua kulpo apartenas al la rusaj prezidento kaj de la registaro, kiuj komencis invadi Ukrainion kun optimisma perspektivo, ke ili povus okupacii la ĉefurbon de Ukrainio ene de tri tagoj, kaj tie starigi pupan registaron. Pro ilia fuŝa decido mortis kaj ankoraŭ mortas multaj ukrainaj kaj rusaj soldatoj en la batalkampo. Ne nur soldatoj, sed ankaŭ multaj civitanoj en diversaj urboj en Ukrainio. Forte kritikinda estas la atakoj per misiloj al la civitanoj en Ukrainio fare de rusia armeo. Nin ŝokis precipe la masakro en la urbo Buĉa.

La kulpo de la rusa prezidento kaj la registaro restas ne nur en tiu nivelo. En tiu ĉi situacio la gvidantoj de multaj ŝtatoj, precipe tiuj en NATO, inkluzive la japanan, intencas pli ampleksigi sian armeon kaj armilaron, kaj fortigi militan aliancon. Ne nur ŝtataj gvidantoj, sed ankaŭ multaj popolanoj akceptas, eĉ aprobas tian tendencon. La ekonomia stato de la tuta mondo havis grave malbonan influon. Halto de eksportado de tritiko el Ukrainio kaŭzis malfacilaĵon en landoj, kiuj bezonas la grenon. Prezaltiĝo de natura gaso kaj ĉiutagaj varoj turmentas homojn ne nur eŭropajn, sed ankaŭ rusajn popolanojn. La historio kvazaŭ estus retroirinta al la 18a aŭ 19a jarcento, en kiu grandaj ŝtatoj koloniisme dividis la mondon.

Ĝenerale, laŭ nia ĝisnuna sperto, registaro komencas militon sub pretekstoj, ekzemple, ke ĝi devas protekti samlandanojn (aŭ samlingvanojn) persekutatajn aŭ perfortatajn en alilanda regiono. Troviĝas ankaŭ alia preteksto, ke ĝi komencis militon por protekti sian patrujon kontraŭ agreso aŭ invado fare de aliaj ŝtatoj. La plej cinika preteksto estas, ke ĝi militas por establi eternan (aŭ longdaŭran) pacon. Paco per milito. Milito por paco. Esprimoj memkontraŭdiraj. Sed la invadantoj ne rimarkas, nek hontas pri tia kontraŭdiro.

Japanio mem havis la historian sperton, ke ĝi agrese invadis Manĉurion (la nordan regionon de Ĉinio) por teni aŭ prosperigi la ekonomian staton de la lando. Ĝi mem knedis atakon al fervojo kaj trompe insistis, ke tion faris ĉinaj partizanoj. Sub tiu preteksto ĝi komencis invadon je la nomo "Incidento de Manĉurio". Ĝi nomis la invadon ne "milito", sed "incidento", por laŭeble eviti ekonomian blokadon fare de la ŝtatoj apartenataj al la Ligo de Nacioj. La japana registaro montris belan sloganon "konstrui en Manĉurio pacan ŝtaton, en kiu kvin nacioj (japano, koreo, manĉuro, mongolo, ĉino) harmonie vivos". Plejparto de japanoj ne estis informitaj pri la vero kaj subtenis la agadon de sia registaro. Nun tre simila fenomeno okazas en Rusio.

Se unu fojon komenciĝinta, haltigi militon estas tre malfacile, same kiel incendion de montaj arbaroj ni ne povas facile estingi. Mortis, mortas, mortos miloj da homoj. En ordinara stato mortigi homon estas grava krimo, sed en milito mortigi fariĝas honora afero, eĉ devo.

La milito inter Rusio kaj Ukrainio iam iel finiĝos, sed abomeno de la loĝantoj en Ukrainio kontraŭ rusoj daŭros dekojn da jaroj. Ankaŭ rusoj eble devas timi venĝon fare de ukrainoj longe. Detruo kaj frakaso okazas ne nur ĉe konstruaĵoj, sed ankaŭ ĉe la menso de homoj. Malamo kaj timo estas neeviteble heredotaj generacion post generacio.

En milita stato la ŝtatoj nepre fariĝas totalismaj, senkonsidere al kiu flanko ili apartenas, eĉ se ilia reĝimo

estas demokrata. Ĉar en militanta stato la ŝtatoj devas regi la popolanojn por rekrutigi kaj mobilizi novajn soldatojn. Ili devas stimuli patriotismon kaj batalemon, kaj eviti tediĝon kaj abomenon kontraŭ milito inter la popolanoj. Ili limigas liberan informadon fare de komunilioj, kaj malpermesas al la popolanoj esprimi sin kontraŭ la milito. Ili pravigas sian starpunkton kaj agadon per bele ornamitaj vortoj, kaj liveras informojn nur favorajn al sia flanko, kaj tiel blindigas la popolanojn. Totalismo venas ne nur de supre, sed ankaŭ de sube. La popolanoj mem diskriminacias tiujn, kiuj ne obeas kaj kontraŭstaras al la militarismo. La atmosfero de la tuta socio fariĝas rigida, sufoka kaj peza. Inter naciismo kaj naziismo troviĝas nur unu litero da diferenco. Japanoj spertis tian fenomenon dum dekoj da jaroj antaŭ la jaro 1945, ĝis la malvenko en la pacifika milito. Al mi ŝajnas, ke nun la samon spertas rusoj, kaj eble ankaŭ ukrainoj.

Nun multaj landoj akcelas armadon. La konkuro ne povas halti, se unu fojon ĝi komenciĝis. Pli ampleksigi, pli efektivigi, pli multe ekipi, havi pli potencajn nukleajn armilojn, produkti senhomajn armilojn manipulatajn de artefarita inteligento... Kia malinteligenta vivaĵo estas la homaro! Ni preparas nin por kompleta pereo.

Pro la mondmilitoj Unua kaj Dua, oni klare konsciis la kruelecon de milito. Sed en la posta duono de 20a jarcento okazis militoj en la Korea Duoninsulo, Vjetnamio, Araba Golfo, Irako, Afganio. Kaj nun en la 21a jarcento denove okazis milito en Ukrainio. La lastaj militoj okazas sen milit-deklaro. Do, formale la sangaj konfliktoj ne estus militoj laŭ la internacia juro. Sed la krueleco kaj suferado de popolanoj estas samaj kiel tiuj en la lastaj "oficialaj" militoj. Krom tiuj relative grandaj militoj, lokaj konfliktoj per armiloj daŭris kaj ankoraŭ daŭras en iuj ŝtatoj en Afriko, Mezoriento kaj Azio.

Kial ankoraŭ nun ni ne povas ekstermi militojn?

Unuiĝintaj Nacioj estas formitaj ĉefe de venkintoj de la Dua mondmilito. La venkintaj ŝtatoj egoisme konkludis, ke ili estas centprocente justaj kontraŭ la venkitoj, kaj restis senpripensaj pri sia kulpo: koloniado, subpremado kontraŭ minoritataj nacioj, arbitra divido de teritorioj por sia profito, monopolado de naturaj riĉaĵoj. Ni scias, ke malantaŭ la nunaj militoj kaj lokaj konfliktoj staras grandaj ŝtatoj aŭ ŝtatgrupoj. Ili intervenas en la konfliktoj kaŝe aŭ senkaŝe, ne por paco, sed por sia profito politika komerca kaj industria.

La ŝtataj estroj ne povas peni nuligi militon, ĉar ili estas katenitaj de tiel nomata "profito de la nacio". Milit-industrio akiros grandan profiton, ĉar armiloj kaj obusoj estos konsumitaj en grandega kvanto, kaj la ŝtatoj pagos malavare por tio. La industrio milita estas nun ne disigebla parto de la tuta ekonomia sistemo de multaj ŝtatoj.

Sed por ordinaraj homoj, loĝantoj kaj civitanoj, milito donos nur damaĝon, mizeron kaj turmenton. Ni devas kovri per nia imposto la necesan koston por armado. Eĉ sangon ni devas verŝi, kiam la ŝtato mobilizas nin. Kial ni devas mortigi iun, kun kiu ni neniam interparolis, nek havis ian malbonan rilaton?

En la lastaj jaroj oni nervozas ĉefe pri la problemo de klimatŝanĝiĝo. Sed multe pli grava, urĝa kaj prioritata problemo estas milito kaj armado, kiuj dediĉas grandan kvanton da energio nur por difekti la vivmedion kaj terglobon.

La sola espero estas solidareco inter popolanoj trans nacieco, ŝtataneco kaj patriotismo. Do, niaj sennaciismo, homaranismo kaj anarkiismo estas des pli valoraj en la nuna kruela mondo.

Huzimaki keniti (32659)

